

La situacio de la planlingvoj en Svislando kaj iliaj influoj sur Esperanton laŭ Tazio Carlevaro

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-809/264, 1979 aprilo 12 kaj 14

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-38/SRI-1979-38-A-1-264-809-1979-04-12-14-Claude-Gacond-La-situacio-de-la-planlingvoj-en-Svislando-kaj-iliaj-influoj-sur-esperanton-lau-Tazio-Carlevaro.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ĉi-semajne finiĝas la prezento en la Svisa Nacia Biblioteko de la ekspozicio pri la temo 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando'. Dum la inaŭgura ceremonio de tiu ĉi ekspozicio, okaze de forumo disvolviĝinta ĉe Svisa Radio Internacia, s-ro Tazio Carlevaro, unu el la pretigintoj de la ekspozicio priskribis la aktualan situacion de la diversaj skoloj interlingvistikaj, kiuj karakterizas la historion de planlingvismo. Porinforme ni memorigas al vi, ke antaŭ Esperanto ekzistis la lingvo Volapük, kiu ĉi-jare estas ekzakte cent jara. En 1908 naskiĝis Ido, en 1922 naskiĝis Occidental kaj en 1951 Interlingua. Fakte, nur Esperanto vere disvolviĝis. Sed tio ne malhelpas, ke ekzistas movadetoj, kiuj kultivas la aliajn planlingvojn. Aŭdu, kion la fakulo Tazio Carlevaro, kiu parolas ĉiujn tiujn ĉi lingvojn, diras pri ili.

TC.- La nuna situacio de tiuj skoloj efektive estas sufiĉe kritika. En la senco ke mankas aktivaj homoj kaj ke la malmultaj aktivaj homoj, kiuj praktikas tiujn planlingvojn efektive estas tre malmultaj. Kaj tial, vi vidis, mi klopodis kalkuli kaj mi kredas ke la kalkulo estis sufiĉe korekta, ni klopodis kalkuli kiom da esperantistoj aktivaj estas en Svislando kaj ni alvenis al cifero 2'000 proksimume, ĉu ne? Ni kalkulis ankaŭ kiom da idistoj, kiom da occidentalistoj, kiom da interlinguaistoj, kaj ni vidis ke estas malmultaj homoj. La respondo: tiu estas unu maniero kalkuli kiom da ili estas. Oni povus kalkuli alimaniere, oni povus demandi sin kiom da paĝoj aperis en Ido en Svislando en la jaro 1978 ekzemple, aŭ kiom da paĝoj aperis en Interlingua kaj ni vidus ke proksimume tiu statistiko, kiun ni faris rilate la homojn efektive validas ankaŭ por la paĝoj presitaj aŭ la paĝoj multobligitaj. Vi vidis ke estas granda misproporcio inter la spaco, kiun ni dediĉis al interlingvistiko kaj al la fakta hodiaŭa signifo de tiuj movadoj en Svislando. Tamen, ni ne devas forgesi ke ili estis foje multe pli fortaj kaj multe pli aktivaj. Kaj ke ili, mi kredas, ili iel influis ankaŭ esperanto-movadon siatempe. Kaj ke cetere iusence ni havas la raran, la maloftan privilegion havi en nia lando specon de muzeo, ĉu ne, kaj se jam ĝi estas do ni flegu ĝin.

Cl.- Vivanta muzeo, vi volas diri...

TC.- Ja, ja. Jes.

Cl.- La statistikaj informoj, kiujn ni donas en la ekspozicio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando' pri la diversaj planlingvoj, registras 2'000 esperanto-parolantojn en Svislando kaj poste nur 25 idistojn, 20 adeptojn de Interlingua kaj 5 occidentalistojn. Ni tre verŝajne iom troigis la forton de tiuj ĉi movadoj mortantaj pro nekapablo akiri novajn fortojn. S-ro Tazio Carlevaro poste estis petata diri kiajn influojn sur Esperanton havis la diversaj konkurencaj lingvoj, Volapük, Ido, Occidental kaj Interlingua. Aŭdu lian respondon.

TC.- Dependas de la epoko kaj dependas de la planlingvo. Ekzemple multaj el la iamaj volapükistoj, almenaŭ la plej aktivaj, fariĝis esperantistoj siatempe. Kaj do fakte en Svislando kelkaj, ne ĉiuj, sed kelkaj el ili, ĉefe en germanlingva Svislando estis la iniciatintoj de la esperanto-movado. Ne en Romandio, ĉar en Romandio, laŭ mia scio, Volapük-movado neniam estis aŭ preskaŭ neniam estis. Kaj do esperanto-movado en Romandio kaj efektive ni

vidas, ankaŭ la tradicioj en la du landopartoj estis malsamaj. Tio estas eĉ pozitiva, se mi povas tiel esprimi, se mi povas esprimiĝi tiel, estas la pozitiva influo de Volapük je Esperanto. Negativaj influoj mi ne kredas ke estis multaj. Nature, rilate Idon la afero estis tute alia en la senco ke, vi scias, la Ido-movado transprenis grandan parton de jamaj volapükistoj esperantistiĝintaj en Germanio. En Romandio multe malpli ekzemple. Krom en la katolika parto de Romandio. Estas tute kurioza afero. Kaj tio tamen kaŭzis finfine, unue rompon en esperantistaj grupoj, sed poste permesis, ke la esperantistoj tamen rekreu pli fortan, pli firman kaj ankaŭ pli unuecan movadon, finfine. Kaj pri la aliaj movadoj la problemoj estis tamen iomete alia. Iomete alia ĉar se vi vidas la Ido-movadon, ĝi evoluis proksimume, laŭ la organiza vidpunkto, kiel la Esperanto-movado. Nome estas grupoj lokaj, estis gazetoj, estis internacia organizaĵo, renkontiĝoj, kongresoj ktp., ktp. Pluraj okazis ankaŭ en Svislando, vi vidis la fotojn en la ekspozicio. Kontraŭe la tielnomata novlatinoida skolo, do la skolo al kiu apartenas Occidental kaj Interlingua, estas preskaŭ aro aŭ grupo aŭ ne bone organizita aro, jes, el homoj, kiuj havas interesojn ekskluzive filologiajn, kaj kiuj ne interesiĝas pri kunveno. Estas tute kurioze. Eĉ homoj, kiuj loĝas ne malproksime unuj de la aliaj neniam kunvenis kaj ne konas aŭ ne konis sin reciproke. Kaj en tio efektive mi dubas ke Occidental-movado multe influis la esperantan krom je certa momento tuj post la mondmilito, kiam estis certa konflikto inter la du pro la aktiva propagando de iom malgranda grupo ĉefe en Romandio. Sed ankaŭ, se mi ne eraras, en Zuriko.

Cl.- En tiu ĉi forumo okazinta ĉe Svisa Radio Internacia pri la ekspozicio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando', responde al demandoj pri la prezentita materialo, interalie libroj kaj gazetoj, mi havis la okazon alvoki al pli digna prezento. Aŭdu miajn tiamajn dirojn, kiuj ŝajnas al mi meditigaj :

«Mi sentas ke ĉiuj tendencoj, mi ŝatas uzi la vorton 'skoloj' por tiuj tendencoj, ŝatas troigi la propran valoron kaj subtaksi la valoron aŭ la gravecon de la aliaj. Kaj kiam mi devis komenci – kaj tio estas eble respondo pri la libroj – kontroli por havi la libron, mi devas diri ke la plimulto de niaj libroj ne havas la nomon de la aŭtoro sur la kovrilpaĝo. Kaj tio estas hontindaĵo, kaj estas tre malfacile prezenti ilin, kaj la plimulto de la nuntempe eldonataj libroj estas mizer-aspektaj. Do, mi esperas ke la esperantistoj konscias, ke ne nur sufiĉas eldoni, sed ankaŭ prizorgi la aspekton de siaj eldonaĵoj. Mi havis ankaŭ la saman problemon pri la organoj de niaj lokaj grupoj. Aŭ mi metas ilin kaj mi hontas pri la stilo kaj la lingvaĵo de kelkaj sur kelkaj en nia lingvo la situacio estas tia, ke sur unu paĝo oni povas trovi pli ol tridek gramatikaj eraroj kontraŭfundamentaj. Kaj mi pensas ke tiu ĉi ekspozicio devas ankaŭ vipi nian propran energion, por ke ĉiuj grupoj prizorgu la aspekton de sia laboro.»

Post tiuj ĉi iom vipaj vortoj, kiujn mi faris en la kadro de la forumo pri la ekspozicio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando', mi nur anoncas, ke parto de tiu ĉi ekspozicio migros, interalie al Lucerno.

Salutas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ĝis reaŭdo!